# *Kubo aspiras fermi la kurson 2019-2020 en ?iuj universitatoj decembre.*



Havano, sep 17 (RHK) La prioritato de la nuna etapo estas fini anta? la 30-a de oktobro la ekzercojn de la finstudado kaj tiel fermi la akademian kurson 2019-2020 en ?iuj universitato de la lando anta? fino de decembro", esprimis José Ramón Saborido Loidi, ministro pri supera edukado.

La? raportas la retejo de tiu institucio, dum inter?an?o per videokonferenco kun la universitat-rektoroj kaj ?eneralaj direktoroj de la organoj de scienco, teknologio kaj novigado, la ministro klarigis ke por tio bezonatas apliki ?iujn eblajn variantojn, kiuj ebligu realjustigi la temar-desegnon kaj garantii tiun procezon kvalite.

Same, oni klarigas ke ?is nun oni garantias la preparon de studentoj de la 12-a grado por la enir-ekzamenoj al Supera Edukado. La ministro precizigis ke por la alvoko anta?vidita por la 9-a de oktobro prezenti?os studentoj de 12 teritorioj, kiuj reprezentas 67,3%  de la landaj aspirantoj.

Temas pri Guantánamo, Santiago de Cuba, Holguín, Granma, Las Tunas, Camagüey, Sancti Spíritus, Villa Clara, Cienfuegos, Mayabeque, Pinar del Río kaj la speciala municipo  Insulo de Junularo. Dume, por la studentoj de Havano, Artemisa, Matanzas kaj Ciego de Ávila, oni faros alian alvokon, kiam la epidemiologia situacio permesu tion realigi.

La ministro emfazis ke “estas tempo pensi kaj labori pli unuece en la kolektivoj por garantii kun kvalito novan skemon de la temaro cele al la venonta lerno-jaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/234391-kubo-aspiras-fermi-la-kurson-2019-2020-en-ciuj-universitatoj-decembre

**Radio Habana Cuba**